# *Erdogan taksas la murdon de la rusa diplomato provoko kaj esprimas kondolencojn.*



Ankaro, 20 dec (RHK) La turka prezidento Recep Tayyip Erdogan esprimis ?i-frumatene al sia rusa homologo, Vladimis Putin, siajn kondolencojn pro la murdo  de la rusa ambasadoro en la turka ?efurbo, kaj taksis ?in provoko.

La turka  prezidento esprimis sian konsenton kun Putin, pri tio ke temas pri provoko, kaj ne estas malsamopinioj pri  tio, li emfazis dum deklaro al la amaskomunikiloj, la? raportis la kuba informagentejo Prensa Latina.

Depost la telefonvoko, la gvidanto emfazis ke amba? registaroj volas kreskigi la reciprokan kunlaboron, kiu rezultigis la evakuadon de civiluloj de Alepo, batitaj de la milito en Sirio.

Por Erdogan, la murdo de la rusa diplomato, Andrei Karlov, estis anka? atako  kontra? la ?tato kaj la popolo turka, kaj evidenta provoko kontra? la rilatoj inter amba? landoj.

Li same informis ke la ?efministro, la ministro pri internaj aferoj, la ministro pri sano kaj aliaj altrangaj funkciuloj rilataj al la esplorado de la atako kontra? Karlov, laboradas en la analizo de la faktoj, kaj al ili

ali?os aliaj venintaj el Moksvo.

Rusio petis pli da sekureco por siaj diplomatoj en Turkio, dum Putin alvokis al fortigo de la milito kontra? terorismo responde al tiu ?i murdo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/116030-erdogan-taksas-la-murdon-de-la-rusa-diplomato-provoko-kaj-esprimas-kondolencojn

Radio Habana Cuba